

& Sur unu kordo. (Defendo de l' rimo):

< Rekante 15 el 31 batoj por strofo, entute 310 paŝoj dum 4 minutoj. Poemon verkis Antoni Grabowski (1912). Baladigis Martin Strid per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:31> (

a;do /(domi somi remi faami;mi remi fare fami do;do)×

(#Rekantaĵe: LaLado miso somi remi; fami reremi fami domi; TiTire dore doTi LaSo LaLa La)

)×10)+

(&Strofoj:

'1 Sur lir' dukorda, diris oni, ; Ne eblas rima son', kaj jen ; Pro tio devas taktbastoni ; Antikvajn ritmojn Lafonten'.

(×:; **Do paŝu fiere en la ĉeno ; Manoj kune en firma teno ; Aŭdi rakonton de la klara voĉo jen.**)

'2 Do mi demandas ridetante, ; Ĉu ne aperos ankaŭ sen ; Ornama rim' estrin' de Dante, ; Vestite en ĥiton' aŭ ĥlen'.
.....

'3 Dukorda liro? – Tial zumi ; Kaj tinti adasiste mem; Mi devas? Kordojn havas du mi, ; Sed fingrojn kvin por kord-ekprem'!

'4 Dukorda lir' ne igas fini ; La kanton, se nur en lerneĵ' ; De l' granda majstro Paganini ; Ni studis diligente plej.

'5 Ŝiriĝis kord'!... Apollo punu ; Liriston, se ne scias li ; Ludadi plu, sur lasta unu ;en tri-kvin-sep-a pozici'!

'6 Senrima kanto estas por mi ; Flor' sekigita sen odor', ; Aŭtun-arbar' iĝanta dormi – ; La muzikistoj flugis for.

'7 Jen fluis riveret' antaŭ mi, ; Sed marĉon formas nun, kaj jam ; Ne scias murmureti, ŝaŭmi; Ĝin kovris iaŝima skvam'.

'8 Kun rimoj dolĉa kant', sen ili ; Parol' senmelodia, ĉar ; Kiel ĝi povas fajfi, trili ; Kun najtingal' en arbetar'?

'9 De l' rim' potencon konas ĉiu, ; Ĝi muĝu, fulmu, tondru tuj! ; Ekfrapu kor', okul' radiu: ; "Antaŭen filoj de l' patruj'!"

'10 Sur stel-standardo Majstro-bardo, ; Skribante himnon, rimis ĝin; Esper' sonoru al homar' do ; Per rim' en teropartoj kvin!